Ubytování ve *** hotelu (1 nocleh se snídaní, vlastní koupelna):

	2 dny	3 dny
Kat. A: jednolůžkový pokoj	340	510 Kčs
Kat. B: 1 lůžko ve dvoulůžkovém pokoji	300	450 Kčs

Ubytování v hotelu (1 nocleh se snídaní, společná koupelna a WC na patře):

	2 dny	3 dny
Kat. C: jednolůžkový pokoj	240	360 Kčs
Kat. D: 1 lůžko ve dvoulůžkovém pokoji	200	300 Kčs

Ubytování ve školním internátu na kraji města) se snídaní, společná koupelna a WC na patře):

	2 dny	3dny
Kat. E: 1 lůžko v 3-lůžkovém pokoji	140	210 Kčs

Společné obědy a večeře jsou zajištěny v sanatoriu Thermal, za 90 korun na den.

MALLONGIGITA JARRAPORTO DE NIA PREZIDANTO
KONFERENCO EN PARDUBICE

Influo de la nuntempa ekonomia situacio. En tiu ĉi parto d-ro inĝ. Petr Chrdle malkaŝe parolis pri la influoj de la nuntempa ekonomia situacio al la agado de la asocio. El la negativaj rezultoj li nomis interalie:

- malkreskon de partoprenantaro de E-aranĝoj
- malkreskon de membroj de la asocio
- malkreskon de la intereso pri aĉeto de E-literaturo
- signifoplenan altiĝon de la elspezoj de ĈEA (luprezo de la asocia oficejo, elektra energio, poligrafiaĵoj, poŝtaj tarifoj).

Vojo al venko kontraŭ tiaj efektive negativaj kondiĉoj. Jam ekde 1991 la Konsilio de ĈEA serĉas vojojn al venko aŭ almenaŭ rezisto kontraŭ la menciitaj malfavoraj kondiĉoj, inter alie per:

- pliefektivigo de la informluo direkte al membroj per regule aperanta Starto, kio ebligis nuligi aperadon de informbultenoj por klubaj funkciuloj kaj individuaj membroj. Tiukaze li dankis al la redaktora duopo Malovec - Daněk por ilia tiurilata laboro.
- Unufoje jare preparo de iu granda aranĝo plej grade por eksterlandanoj, kiu povos porti al ni krom la ĝuo de la etoso ankaŭ iom da tiom bezonata ekonomia gajno. En 1991 ĝi estis IFEF-kongreso, en 1992 antaŭkongreso en Prago.

- Partopreno en la kupona privatigo de nia nacia ekonomio. Tiurilate li dankis al s-ro Laŭbe por lia propono, kiu montriĝis efektivebla kaj precipe al tiuj membroj de ĈEA, kiuj donis je dispono parton de siaj kuponoj favore al ĈEA. Kvankam ĉi tiu ago ne portas tujan profiton (eĉ male), ĝi estas promeso por estonteco, ke ĈEA kapablos aktivi ankaŭ en novaj ekonomiaj kondiĉoj.

- Nepopulara, sed en la nuna situacio nepre bezonata estas plialtigo de la membrokotizo tiagrade, ke ĝi kovru almenaŭ la verajn kostojn kunigitajn kun produktado de la asocia organo Starto.

Parolante pri la ĉefaj ĉijaraj aranĝoj li tre pozitive aprezis organizan flankon de la antaŭkongreso de la 77-a UK kunigitan kun la seminario pri Komenio en Prago kaj dankis tiurilate al geedzoj Dvořák, kiuj portis ĉefan respondecon kaj dediĉis sin plene al la afero.

La prezidanto menciis ankaŭ kunlaboron kun eksteraj esperantistaj organizoj (TEJO, EŜLI, IFEF, ILEI, IKUE, ISAE, KELI, AIS k.a.), ĉefe kun SEA - la kunordiga komitato en novembro certe trovos konvenan vojon por plua kunlaboro.

El neesperantistaj institucioj li pozitive taksis sintenon de la Ministerio pri Kulturo, pruvitan lastafoje dum la antaŭkongreso, kunlaboron kun Ĉeĥoslovakaj Fervojoj pere de la landa sekcio de FISAIC, kontaktojn kun Ministerio por Edukado pere de la Ĉeĥa filio de AIS, ekonomian kunlaboron kun la vojaĝagentejo Tourgast (komuna uzo de la sekretariejo) kaj kun la Radikala Partio (kiu presas por ni alglueblajn adresojn por dissendado de Starto).

Nia plej grava tasko en la venonta periodo estas bonkvalita preparo de la komuna kongreso de ĈEA kaj GEA en Karlovy Vary.

Ekzistas du specoj de malkontenteco: la unua nur veas kaj perdigas al ni eĉ tion, kion ni havas, la alia pelas nin al diligenta laboro por atingi en la novaj ekonomiaj kondiĉoj eĉ pli bonajn rezultojn ol antaŭe. Ni estu malkontentaj ĉiam nur per la dua, kreema kaj atingu pli riĉan aktivadon ene de nia asocio.

Klub esperantistů Brno založil "Esperantskou literární nadaci" zaregistrovanou dne 24.9.1992 u Magistrátu města Brna pod č.j. 32/92/NA a mající u České spořitelny a.s., Koblížná 21, Brno, účet: 5243555-628/0800. Esperantský název: Esperanta Literatura Fondajo (ELFo). Nadace požádala Radu nadací při vládě ČR o příspěvek z Fondu národního jmění, ale hlavním zdrojem příjmů by se měly stát dary příznivců literatury.

Cílem nadace je vydávat esperantskou literaturu původní i přeloženou a pomocí překladů propagovat naši národní kulturu v zahraničí a esperantskou doma. Dnes existující přibližně osmdesátku rukopisů, hlavně překladů, je třeba připravit pro vydání a postupně je podle disponibilních finančních zdrojů vydávat. Nadace bude současně pořádat a podporovat semináře a další akce o překladatelství.

Již bylo započato s počítačovým zpracováním všech dostupných rukopisů, aby se zabránilo jejich ztrátám a aby byly připraveny pro rychlou sazbu, naskytne-li se možnost vydání.

Rada nadace se obrací s nabídkou spolupráce a s žádostí o pomoc:

- a) k autorům a překladatelům, jejichž rukopisy čekají na příležitost k vydání
- b) ke každému, kdo má možnost zpracovávat texty na počítači
- c) k jazykovým odborníkům při revizích a kontrole připravovaných textů
- d) k nakladatelům, kteří mají zájem se podílet na vydávání esperantských knih

- e) ke knihkupcům, kteří se zájímají o distribuci a propagaci esperantské knihy
- f) ke každému, kdo je ochoten se podílet na provozní práci nadace

Adresa nadace: Esperantská literární nadace, pošt. příhr. 154, 657 54 Brno

Prologem k vydavatelské činnosti nadace je vydání textu lidové hry o Faustovi (Doktoro Johano Fausto), s níž brněnské loutkové divadlo Radost získalo letos na festivalu v Klagenfurtu třetí cenu. Na příští rok připravujeme vydání Čapkovy Války s Mloky v překladu J. Vondrouška, Pumprova libreta Prodané nevěsty a Vlastního životopisu Karla IV.

DOKTORO JOHANO FAŬSTO



Esperanta Literatura Fondajo (ELFo) estis fondita en Brno por prepari publikigon kaj laŭeble publikigi manuskriptojn en Esperanto aŭ el Esperanto kaj propagandi tiamaniere la nacian literaturon en eksterlando kaj Esperantan en Ĉeĥoslovakio. Por la jaro 1993 ni preparas verkojn Milito kontraŭ Salamandroj de Karel Čapek kaj Propra biografio de Karolo IV (ambaŭ en traduko de Josef Vondroušek) kaj Vendita fianĉino de Karel Sabina (libreto por opero de B. Smetana) en traduko de Tomáš Pumpr. Kontribuojn eblas sendi al la konto 5243555-628/0800, Česká spořitelna, Koblížná 21, Brno.

KONFERENCO DE ĈEA
PARDUBICE 23.-25. 10. 1992

La ĉijara konferenco de ĈEA vivis precipe per preparo al la komuna ĉeĥa-germana kongreso, per preparo de nova statuto kaj solvo de financaj problemoj.

Ing. Miloš Bloudek informis, ke la kongreso okazos en la hotelo Termal fine de majo 1993. La kongresa kotizo estos por enlandanoj 100 kaj 150 kronojn (pagoj antaŭ kaj post 31.3.1993), delegitoj, honoraj membroj kaj proponitaj kandidatoj senpage. Eksterlandaj gastoj pagos 60 aŭ 90 DM.

Pri la problemoj de statuto, de fondaĵoj kaj de juraj preskriboj ĝenerale informis advokato el Brno JUDr. Vlastimil Vlk. La postrevolucia tempo alportis multajn problemojn kaj financajn ŝarĝojn, sed samtempe malfermis novajn vojojn al prospero zigzagantaj en la jura labirinto. Ni devas lerni venki la problemojn kaj utiligi la novajn perspektivojn.

Sekretario Ing. Zdeněk Pluhař kaj vicprezidanto Ing. Vladimír Dvořák informis pri la financaj problemoj de la asocio. Alte leviĝis la lukostoj kaj asekuro por la sekretario (proksimume 50 mil kronojn jare), kreskas kostoj por Starto (duobligas prezo de enpoŝtigo kaj la samo okazos baldaŭ ĉe prezo de papero). Aliflanke kreskis la poligrafia kvalito de Starto, aperis Jarlibro kaj libro pri Komenio, realiĝis gravaj internaciaj aranĝoj (pasintjare IFEF-kongreso, ĉijare antaŭkongreso, venontjare komuna kongreseo kun GEA), nur la asocio povas realigi publikigon de novaj verkoj kaj lerniloj. La situacio necesigas iom levi la membrototizojn, kiuj eĉ poste restos tre malaltaj, maksimume 10 kronojn por unu monato.

Detalajn informojn ni publikigas sur la paĝo 2.

S-ro Vaněček klarigis, ke specialaj bezonoj de handikapitoj, precipe senbarieraj kongresejoj kaj prema financa situacio kondukis al formiĝo de memstara asocio de esperantistoj-invalidoj.

S-ro Pavel Sittauer bildigis similkolore la situacion en Somera Esperantista Tendaro Lančov, kie oni devas pagi al la magistrato altajn sumojn, tial ne eblas instrui nun sen la angla kaj germana lingvoj, ĉar esperantistoj nur aliĝas malgrandnombre, kio ne sufiĉas por pagi ĉiujn elspezojn.

En la kultura programo prezentis kelkajn scenetojn infanoj el lokaj Esperanto-kursoj, venis ankaŭ la magiisto Linhart Rýznar kaj sonis pluraj arioj kantataj de Miroslav Smyčka.

(mm)

INTERNACIA KULTURA FESTIVALO
EN ÚSTÍ NAD LABEM

La 5-a Internacia Kultura Festivalo en la urbo Ústí nad Labem (Ĉeĥa resp.) honore al Esperantaj literaturistoj Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr - ilin prezentis prof. D-ro Vlastimil Novobilský kaj Jaroslav Mařík - allogis kelkdekonojn da enlandanoj grupon da bavarianoj el Kronach (kies Esperanto-Klubo amike kontaktas kun tiu en Ústí) kaj kelkajn saksianojn. Ĉiuj estis tre kontentaj.

Krom informaj kontribuoj, turismaj aranĝoj kaj prezentado de la kolora filmo pri japana esperantista geedziĝo en Prago, ĉe kiu Esperanto rolis pontolingve (Novobilský), okazis altnivela kultura vespero age de kantistoj el la ŝtataj operejoj en Prago kaj Ústí nad Labem (Kateřina Kudlíková, Josef Vít, Miroslav Smyčka, Hana Pašková, Jiří Enderš, ĉe piano Jan Zimmer) kaj deklamado de Eva Seemannová (Prago). Dolĉa bomboneto estis majstra violon-

koncerto de la okjara Zuzanka Urbanová (konata interalie el sinprezento en la berlina Televido). Huraon elvokis ĉefine fascina prezento de "Figaro" de Miroslav Smyčka.

jm

SE LA MONDO ESTUS VILAĜO DE 1000 HOMOJ

165 homoj parolus la mandarenan
86 parolus la anglan
83 parolus hindan/urduan
64 parolus la hispanan
58 parolus la rusan
37 parolus la araban

Temas nur pri duono de la vilaĝanoj. La alia duono parolus (en descenda ordo) bengale, portugale, indonezie, japane, germane, france kaj 200 aliajn lingvojn (inkluzive de Esperanto!).

Unu triono de la homoj estas infanoj. Tri el la 1000 personoj mortas pro malsato. Unu persono en la vilaĝo havas la aideson. El 670 plenkreskuloj duono estas analfabetoj. Nur 70 personoj posedas propran aŭtomobilon. 200 homoj ricevas 75% de tuta salajro de la vilaĝo. Nur unu triono povas trinki puran kaj sendanĝeran akvon. Kvin estas soldatoj, 7 instruistoj, nur unu kuracisto kaj 3 rifuĝintoj.

Precize 100 personoj kontrolas ĉiujn nukleajn armilojn posedantajn de la vilaĝo.

(Laŭ la informilo SNEES de la Esperanto-societo West Hartford, Usono).

LABIRINTO DE NUMERALOJ

La revuo El Popola Ĉinio 6/1992 publikigis interesan artikolon de Li Shijun "Promenado inter la numeraloj", en kiu la ĉina samideano atentigas pri malregulaĵoj en la Esperanto-sistemo de numeraloj. Apud la simplaj numeraloj (unu ĝis

mil) ekzistas pluraj nur substantivaj (miliono, miliardo, biliono ktp.), kio kaŭzas certajn problemojn, precipe kiam ili aperas samtempe kaj en akuzativo: *la urbo havas du milionojn unu loĝantojn*. La akuzativo estas duobla iom nenature, aŭ oni devus ŝanĝi la konstruon de la frazo: *la urbo havas unu milionon da loĝantoj kaj unu loĝanton*. Ankaŭ tiu solvo estas mallerta, plie la du kategorioj rezultigas diferencajn adjektivigon: *tria urbo* (tria en la vico) - *miliona urbo* (urbo kun miliono da loĝantoj). Zamenhof sub influo de la slavaj lingvoj malregule uzis la vorteton *da*: *Kiom da ili estis? Ili estis kvar.* - *Da ili estis kvin.* Same malregule impresas formoj: *iom da, multe da, kelke da* ktp. La ĉina samideano proponas reguligi la uzadon de numeraloj per pluaj simplaj: *miljon* (ĉar *milio* havas alian signifon), *miljard*, *biljon*, *kelk*, *plur*, *mult* sen *da*, same kiel *iom*, *kiom*, *ĉiom*, *neniom*, *tiom*: *Kiom loĝantojn havas la urbo? La urbo havas miljon unu loĝantojn*. Sed estos tre malfacile akceptigi la proponon en la konservema Esperantujo.

PERMANA BALBUTADO

Ĝis nun regis opinio, ke balbutado de beboj estas ekzercado de la voĉ-kordoĵoj en la infana gorĝo. Du psikologinoj el la McGill-universitato en Montrealo konstatis "permanan balbutadon" ĉe surmutaj beboj edukataj per gestlingvo. La balbutado estas mekanismo, pere de kiu bebo malkovras rilaton inter la strukturo de la lingvo kaj rimedoj, kiuj estas je dispono por esprimi la strukturon. La mekanismo helpas al beboj identigi la nombron de bazaĵunuoj kaj permesitajn kombinojn.

(laŭ la gazeto Vesmír)

Bernard Golden:

ANKORAŬ PRI LA NOMOJ DE ZAMENHOF

En **Starto 2/1992 (149)**, pĝ. 12, estas artikolo "Al artikoloj pri la nomo de nia Majstro L.L.Zamenhof" el la plumo de aŭtoro, kiu estas plurflanke riproĉinda pro sia nescio de faktoj, misuzo de informoj kaj rezonado bazita sur spekulativo sen apogo de fidindaj atestaĵoj. Estas necese do, pritrakti la plej gravajn mankojn kaj ĝustigi erarojn pri la temo.

La individuaj nomoj de d-ro L.L.Zamenhof

Ekde la unua frazo la aŭtoro mispaŝas, skribante pri la "baptonomoj" de d-ro Zamenhof. Kvankam la aŭtoro ja scias, ke Zamenhof kiel judo ne estis baptita, li tamen senrespondence altrudas la terminon "baptonomoj". Anstataŭe, la aŭtoro estis devinta klarigi, kiel judo ricevas sian individuan nomon. Jen la kutima procedo.

Nomdonado en judaj familioj okazas kadre de tradiciaj moroj. Por virseksa bebo la cirkumcidaj festoj okazas la okan tagon post naskiĝo, krom se malsano devigas prokraston. Dum tiu solena ceremonio la infano to ricevas sian propran nomon. Iomete malsamas la procedo por ineksaj infanoj. En la sama semajno, kiam okazis la naskiĝo, la patro ceremonie proklamas en la sinagogo la nomon, kiun li donas al sia filino.

Tiel, la filo de Marko Zamenhof, kiu naskiĝis en Bialistoko la 3-an de decembro 1859 (laŭ la malnova kalendar-stilo), estis cirkumcidita la 10-an de decembro. Ĉeestis la ceremonion la tuta parencaro kaj ankaŭ individuaj gastoj. Marko Zamenhof donis al sia filo la nomon Lejzer, kiu estas la jida formo de la biblia nomo Eli-

ezer, signifanta hebree "Dihelpo". Kutime la nomo estas tiu de mortinta avo aŭ, se li ankoraŭ vivas, de karmemora parenco.

La sekvan tagon la patro iras al la ŝtatrabeno por enskribigi la novnaskiĝinton en la naskiĝ-registron. Tiu akto enhavas cetere gravajn donitaĵojn pri la gepatroj kaj la nomojn de la funkciuloj de la cirkumcida festo. La enskribita individua nomo fariĝas oficiala laŭ la vidpunkto de la juda religia komunumo. Valora historia font-dokumento estas la fotografaĵo de la koncerna paĝo de la registro-libro. Ĝi jam estis publikita kun la ruslingva teksto, traduko en Esperanton kaj komentoj de zamenhofologoj.

Estas atentinde, ke malgraŭ la elekto de Marko Zamenhof, Lejzer ne estas la vere oficiala nomo. Tiu jida ekvivalento estas nomo uzebla en la ĉiutaga profana vivo; male, por religiaj aferoj oni devas uzi la plejnan hebrean formon de la nomo, Eliezer.

Pro kontaktoj kun aligentaj kulturoj estiĝis kutimo ĉe judoj alpremi alian personan nomon fremdlingvan apud la propralingva. Tiu dua individua nomo ordinaro komenciĝas per la sama litero por memori la originan nomon (ekz. Mordeĥaj/Markus). Tiucele Lejzer Zamenhof ekuzis Lazar (pro rusa influo), sed li ne tuj forlasis uzon de Lejzer. Pli poste li alprenis la polan nomformon Ludwik. Kiam lia frato Leono komencis aktivi kiel esperantisto, d-ro Zamenhof diferencigis la proprajn verkojn disde tiuj de sia frato per kunligo de la du nomoj Lazaro kaj Ludoviko kaj plej ofte subskribis

sian nomon kiel L.L.Zamenhof.

Elokventa atesto de la graveco de la tradicia kaj oficiala hebrea individua nomo troviĝas sur la tomboŝtono de la patro de d-ro Zamenhof. Li ricevis la hebrean nomon Mordeĥaj dum la cirkumcida ceremonio. Lia patro nomiĝis Ŝraga. Dum sia publika, sekulara vivo, la patro de d-ro Zamenhof ne uzis tiujn nomojn, sed elektis kiel individuajn nomon la polan Markus, ĉar li vivis inter poloj; samtempe li povis uzi ankaŭ la ruslingvan ekvivalenton Mark. Ankaŭ la patran nomon li ŝanĝis de Ŝraga al Fabian. Sekve, aperis sur oficialaj dokumentoj la rus-stila nomo Markus Fabiano-viĉ Zamenhof. Tamen, post sia morto li ricevis la tradiciajn hebreajn nomojn. Sur la marmora tabulo de la tomba monumento aperas sub Markus Zamenhof en la pola teksto la nomo Mordeĥaj ben Ŝraga en la hebrea parto.

La signifo kaj prononco de la nomo Zamenhof

En sia artikolo en Starto 2/1992 la aŭtoro faras plurajn asertojn, kiuj ne estas historie pravigeblaj. Li substituas al objektivaj atestaĵoj tro da neapogeblaj supozoj kaj konjektoj. Ni ekzameni unue lian pritrakton de la signifo de la familia nomo Zamenhof, kiu en sia originala formo havis la germanan ortografion "Samenhof" (la germana "s" estas prononcata kiel Esperanta "z").

La aŭtoro asertas - sen iujn dokumentaĵoj - ke la germana formo "Samenhof" estas analizebla kiel kunmetaĵo je du germanaj vortoj: **samen** "semo" kaj **hof** "korto". Lingvistoj nomas tiun naivan klarigon "popola etimologio". Efektive, tiu ĉi maniero klarigi la signifon de Samenhof estas nur unu el pluraj hipotezoj pri la deveno de

la nomo, kiuj jam estis proponitaj. Ankoraŭ kvar etimologioj sekvas.

Kelkaj supozas, ke Samenhof apartenas al la kategorio de familiaj nomoj formitaj laŭ nomoj de urboj kaj vilaĝoj, tiel aludantaj la devenon de prafamiliano (ekz. la nomo Komenský estas spurebla al la moravia vilaĝo Komňa). En suda Germanio estis du vilaĝoj portantaj la nomon Samhof. Oni povas hipotezi, ke iu Zamenhova prapatro vivis en unu el tiuj vilaĝoj kaj, kiam nova rusimperia leĝo postulis frue en la 19-a jc., ke ĉiuj judoj havu familian nomon, li iom modifis la loknomon Samhof por krei Samenhof.

Alia analizo de du ŝajnaj germanaj morfemoj en "Samenhof" klarigas, ke ĝi estas dehakita formo de Samenhafer, kunmetita el **Samen** "semo" kaj **Hafer** "aveno". Temas pri aveno kultivita ne por konsumado, sed por semado. Post perdo de la silabo "er" kaj ŝanĝo de la prononco de la lasta vokalo, Samenhafer fariĝis Samenhof.

La sekvaj du hipotezoj serĉas devenon de la nomo surbaze de slavaj morfemoj. Oni volas kredigi, ke Samenhof estas variaĵo de rusaj familiaj nomoj kiel Simonov, Semenov kaj Simonhoff, ĉiuj signifantaj "filo de Simon".

En la naskiĝ-registro de d-ro Zamenhof lia familia nomo, transskribita kirilalfabete, havas la formon Zamenhof. Pro tio Petro Stojan konjektis, ke ĝi estas rusdevena nomo konsistanta el **zamena** "intersanĝo" kaj **-ov** (familia finaĵo).

Estas certeco pri neniu el la ĉi-supraj klarigoj. Povas esti, ke la deveno de la nomo baziĝas sur tre obskura okazaĵo en la vivhistorio de la familio, kiu neniel estas atestebla per dokumento.

La aŭtoro mispaŝa ankoraŭfoje en sia pritrakto de la prononco de la nomo Zamenhof, ĉar li naive kredas, ke "en la Zamenhofa familio oni parolis ruse". Kiel li scias tion?

Mi interpretas ĉiujn rimarkoj de d-ro Zamenhof pri la rusa kiel hejma lingvo kiel manieron flati la rusojn. En la zamenhofa familio la rusa estis fremda lingvo. En la intima sino de la familio la ĉiutage uzata lingvo estis la jida, kiun la infanoj ricevis kun la patrino lakto, por tiel diri. Estas kelkaj atestaĵoj montrantaj, ke la familianoj daŭre pensis jidlingve. Tion spegulas la sekvaj nomformoj. Okaze de enskribiĝo en la naskiĝmatrikula registro Marko Zamenhof donis al sia filo ne la hebrea nomformon Eliezer, sed la jidan ekvivalenton - Lejzer. La hebrea nomo de Marko Zamenhof estas Mordeĥaj, sed li estis konata ankaŭ laŭ la jida diminutivo Motel, kiu troviĝas sur du oficialaj ruslingvaj dokumentoj. Unu estas atesto de la jaro 1881 skribita de Lazar Motelev Zamenhov (Lazar, filo de Motel) kaj la dua estas la universitata diplomo de d-ro Zamenhof, sur kiu aperas la vortoj "Lazar, filo de Mark (ĝuste Motelev)". Tria ekzemplo koncernas la nomon de la bopatro de d-ro Zamenhof, Aleksandro Silbernĥik. La nekrologo, kiun d-ro Zamenhof verkis, havas la titolon "S.Silbernĥik". La "S" ne estas komposteraro, sed estas la inicialo de la individua nomo Sender, kiu estas indiko de la persista influo de la jida lingvo en la parol- kaj penskutimoj de la familio de d-ro Zamenhof.

Sekve, mankas la logika bazo de la argumento, ke la nomo Zamenhof estis prononcata "Zamengof", ĉar en la rusa alfabeto mankas la sono "h", do

"g" estas uzata anstataŭe. Unue, dum jardekoj la familianoj prononcis Samenhof kun "h" kaj la fonetika modifo de la "S" al "Z" ne ŝanĝis tiun kutimon. Tiu ortografia ŝanĝo havas paralelajn en la bofamilia nomo Silbernĥik/Zilbernĥik, kiu estas same germandevena. Kelkaj boparencoj sekvis la kutimon de Zamenhof skribi la nomon fonetike: male, aliaj daŭrigis la uzon de Silbernĥik. Rimarku, ke eĉ post enkonduko de la formo Zamenhof la nomformo Samenhof estis longe uzata en germanlingvaj kunteksto.

Necesas atenti la diferencan inter transliterado kaj fidela tradukado. En kirilalfabeta teksto loknomoj kiel Gonduras, Gamburk, Iokogama kaj Tegeran devas aperi en latinalfabeta teksto kiel Honduras, Hamburg, Yokohama kaj Teheran respektive. Same, la azbuke skribita formo Zamengof devas esti skribita kaj prononcata Zamenhof. La kialo de la "g" estas tutsimple fonetika manko en la rusa alfabeto.

Pravigas la prononcon de Zamenhof kun la sono "h" la transskribo de tiu nomo per literoj de la hebrea alfabeto sur la tombomonumento de Marko Zamenhof starigita en 1907. Ĝi aperas kiel Zamenhof - ne Zamengof! La plej konvinka pruvo venas el la buŝo de d-ro Zamenhof mem. En 1909, okaze de la 15-a UK en Barcelona, la aŭtoro de Esperanto pretigis fonografan cilindron. Tiu unika sondokumento atestas, ke li prononcis sian nomon ne kiel Zamengof, sed kiel Zamenhof!

Postnoto:

Se iu intencas verki pri zamenhofaj temoj, estas nepre konsilinde, ke li ne plu ĉerpu informojn el la eksmodiĝintaj Originala Verkaro (1929) kaj Enciklopedio de Esperanto

(1933-1934). Rekomendindaj estas la sekvaj verkoj:

1. David L.GOLG. - N.Z.Maimon's **La kaŝita vivo de Zamenhof**. Pĝ. 40-57 en: **Studoj pri la internacia lingvo**, red. Michel Duc Goninaz, Gent; AIMAV; 1987, 156 pĝ.
2. HALINA DOKUMENTO PRI LA STUDENTAJ JAROJ DE L.L.ZAMENHOF. Oficialaj arkivoj gimnaziaj kaj universitataj en la rusa lingvo. Kopiis kaj esperantigis Halina EDELBAUM: komentis Naokazu KAWASAKI, Tokio; memeldonis Juntaro Iŭaŝita: 1977, 239 + 22 pĝ.
3. Adolf HOLZHAUS: **Doktoro kaj lingvo Esperanto**, Helsinki:

Fondumo Esperanto: 1969, 524 pĝ.

4. Adolf HOLZHAUS: **Granda galerio Zamenhofa**, Vol. 1. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1973, 527 pĝ., Vol.2, 1978, 419 pĝ.
5. J.KOHN-CEDEK, Personaj nomoj de Zamenhofa familiano, l'omnibuso, 1976; 1 (71) 1-7; 2 (72):16-23; 4 (74):7 (Eratumo)
6. N.Z.MAINON, **La kaŝita vivo de Zamenhof**, Tokio; Japana Esperanto-Instituto 1978, 214 pĝ.
7. PLENA VERKARO DE L.L.ZAMENHOF, Kioto; Eldonejo Ludovikito 1972

ANTAŭ 500 JAROJ OKAZIS RENKONTIĜO DE EŬROPO KAJ AMERIKO
KRISTOFORO KOLUMBO

De Ende el Odeso

Trankvila stela nokto kaj trankvila senlima maro. Kun meza rapideco ŝovas sin sur la mara ebenaĵo, unu post alia, tri hispanaj "karaveloj" de la XV. centjaro. Mizeraj, facile rompeblaj ŝipoj; ŝipanaron oni ne vidas; ĝi jam longe dormas; sur la ferdekoj oni vidas nur la senmovajn gardstarantojn. Sed nur en la meza ŝipo, kiu portas sur la rando la surskribon "Sankta Maria" kaj admiralan flagon sur la masto, en la malvasta kajuto brulas lumo kaj apud la tablo, kovrita de geografiaj kartoj, sidas en profunda meditado la granda admiralo de Hispanujo, Kristoforo Kolumbo. Dormo ne volas tuŝi liajn okulojn. Jam la duan nokton la admiralo ne kuŝigas sin, la duan tagon turmentas lin unu sama premanta penso. Ankoraŭ du tagoj - kaj, se li ne renkontos teron, la ŝipoj iros returne Hispanujon. Hieraŭ la ŝipanaro arogante sciigis, ke ĝi ne volas iri plu, kaj kun granda malfacileco la admiralo elpetis de ĝi limtempon de tri tagoj.

La suno malleviĝis kaj denove leviĝis, antaŭ li etendis sin tiu sama senlima ebenaĵo da trankvila mistera akvo. Estas vero, ke hodiaŭ la maro alportis du verdajn branĉetojn, ian pikan arbetojn, tabulon kaj rabotitan bastoneton - du sendubajn signojn de proksimeco de tero. Ankaŭ sen tio ĉi li scias, ke tero sin trovas antaŭ li, ke tiu ĉi tero estas proksima, sed ĉu li havos tempon veni al ĝi en tiuj ĉi du tagoj?

Ankoraŭ kvardek ok horoj restas ĝis la fino de tiu ĉi batalo kun la lin persekutanta fato - kaj li batalos ĝis la fino mem! La admiralo fiere sin elektigis ... kaj subite li ekŝancelis, kvazaŭ en tablon, apud kiu li sidis, ekbatus tondra sago. De la antaŭa karavelo ektondris pafego.

Tero!!!

Estis la dua horo je mateno, la 12-an de oktobro de la jaro 1492.

(Nokto, Fundamenta Krestomatio)

Kolumbo albordegis ĉe insuloj en Kariba maro, proklamis ilin posedado de la hispana trono, en Haitio konstruigis la unuan fortikaĵon Puerto de Navidad. Liaj hispanoj igis sin portadi sur la dorsoj de indianoj kaj ne hezitis tranĉadi iliajn gorĝojn nur por elprovi la akrecon de siaj klingoj aŭ por amuzo. Indianoj devis laboregi ĝis elĉerpiĝo kaj ĉiun trian monaton pagi imposton per oro, alie oni mortigis ilin, forhakinte antaŭe iliajn manojn. Virinoj estis perfortataj, gentestroj torturataj kaj ekzekutataj. En 1495 Kolumbo kolektis 1500 indianojn elektis 500 plej fortikajn, surŝipigis ilin, sed dumvoje al Hispanio ducent mortis kaj restintaj estis venditaj kiel sklavoj. La nombro de homoj en Haitio dum kvardek jaroj malkreskis el tri milionoj al tricent.

(Laŭ atesto de dominikano Bartolomeo de Las Casas, kiu ĉion vidis propraokule)

Kolumbo starigis la longan serion da kruelaĵoj, kiujn daŭrigis Pizarro, Cortes, angloj, francoj kaj aliaj Eŭropanoj. Ne okazis "malkovro" de Ameriko, ĉar ĝi ne estis senhoma, dezerta kontinento, sed nur renkontiĝo kaj konfrontiĝo de du homaj rasoj, el kiuj unu dum 500 jaroj preskaŭ neniiĝis la alian. La genocido kontraŭ naturaj homoj estas daŭrigata eĉ nuntempe, en Ameriko, Afriko, Nov-Zelando, Aŭstralio, Indonezio, Siberio.

Profunde en niaj koroj enradikiĝis facilanima senkulpigado de ĉiuj barbarajoj kiel de bedaŭrinda, sed neevitebla prezo de progreso. Sed en la mondo de murdistoj, kaj viktimoj estas devo de pensantaj homoj ne aparteni al la murdistoj (A. Camus)

NOBEL-PREMIO DE PACO POR INDIANINO

La 16-an de oktobro 1992 aljuĝis la norvega Nobel-Instituto en Oslo la Nobel-premion de Paco al la indiana aktivistino **Rigoberta Menchu** pro ŝia strebado pri sociala justeco, pri repacigo de diversaj etnaj grupoj kaj pro ŝia batalo por respektado de la rajtoj de Indianoj ne nur en ŝia lando, sed en la tuta Ameriko.

La 33-jara Rigoberta Menchu el Gvatemalo estas unu el la plej junaj Nobel-premiitoj. Ŝi naskiĝis en 1959 kaj kreskis en malgranda vilaĝo en okcidenta Gvatemalo. Kune kun la gepatroj kaj kvin gefratoj ŝi laboris sur kaf- kaj kanplantaĝoj. Plejparto de ŝiaj proksimaj parencoj, patro, patrino kaj frato, estis mortigitaj. La patro de Rigoberta, Vicente, estis unu el unuaj indianoj, kiuj provis en eksterlando alarmi pri la mizero kaj sufero de la indiana loĝantaro, kaj li pagis sian aktivadon per la vivo. Kune kun 38 pluaĵ batalantoj por la indianaĵ rajtoj li pereis komence de 1980 en la hispana ambasadorejo en Gvatemalo.

Rigoberta trovis rifuĝejon en monaĥinejo. Ĉi tie ŝi aliĝis al Komitato por Unuiĝo de Terkultivistoj, kiun fondis ŝia patro kaj en kies frunto nun staras ŝi mem. Batalon por la homaj rajtoj kaj respektado de la indiana loĝantaro en Gvatemalo kaj en la tuta Latina Ameriko ŝi gvidas el la ekzilo en Meksikio, kie ŝi vivas ekde 1981. Rigoberta Menchu estas de majaa deveno. Majaoj konsistigas 60% de la gvatemala populacio, sed iliaj rajtoj estas praktike nulaj. En 1982 ŝi eniris en Unuiĝon de Gvatemala Opozicio kaj ekde 1985 ŝi kunlaboras kun komisiono por la homaj rajtoj ĉe UNO.

KUPÓNOVÁ PRIVATIZACE PRO ČES

Český esperantský svaz určitě není jediným, na koho těžce doléhá současná hospodářská krize. Vydání každé koruny musí pečlivě zvažovat. Přesto rada ČES považovala za rozumné dívat se nejen několik týdnů dopředu, ale i do budoucnosti vzdálené více let, když rozhodla o podniku, který bychom mohli nazvat "Kupónová privatizace pro ČES". Rada schválila uvolnění 50 až 60 tisíc Kčs pro tento podnik a v lednu t.r. vydala výzvu ke svým členům, aby se účastnili první vlny kupónové privatizace ve prospěch našeho svazu.

Celý záměr možno ve stručnosti popsat asi takto: Rada ČES nabídla členům, že jim uhradí 1.200,- Kčs za kupónovou knížku, kupónovou známku a za výdaje bezprostředně spojené s akcí (poštovné, cestovné a pod.), zařadí je do členské kategorie "F" (doživotní členové) a umožní v prodejní svazu si vybrat zboží v ceně do 100,- Kčs. V případě účastníků, kteří již doživotními členy jsou, umožní převzetí zboží v ceně do 400,- Kčs. Zúčastnění členové se za tato plnění měli

zavázat, že postoupí 50% získaných akcií svazu. Výzva byla směřována těm, kteří o zapojení do kupónové privatizace neuvážovali, ale přihlásila se i řada těch, kteří již kupónové knížky a známky měli zakoupené.

Na výzvu rady se přihlásilo více než 50 osob, takže uvolněná peněžní částka bude celá vyčerpána. V současné době jsou podepisovány definitivní smlouvy mezi svazem a jednotlivými účastníky; smlouvu zpracovávala advokátní poradna.

Rada ČES si velmi váží obětavosti těch členů, kteří se do KP ve prospěch svazu zapojili. Řadě z nich byly slavnostně předány členské průkazy doživotních členů na 2. konferenci ČES v Rybitví dne 24. října t.r. Řada se však z různých důvodů zúčastnit konference nemohla, těm budou průkazy předány jinak. Dík však patří všem, proto považujeme za svou povinnost uveřejnit jména všech, kteří do dnešního dne (1. listopad 1992) podepsali definitivní smlouvu s ČES. Jsou to tito účastníci:

Milena Beranová z Volar
Františka Blažková z Hradce Králové
Věra Bouchnerová z Nové Paky
Marie Čapková z Teplic
Marie Deisznerová z Dašic v Čechách
Danuše Gattermayerová z Kroměříže
Vlasta Hájková z Vraného nad Vltavou
Marie Hasalová z Hodonína
RNDr. Jan Hejčman z Prahy - Záběhlic
Roman Heřman z Kosmonos
Josef Hofman z Plzně
Bohumil Horný z Hranic na Moravě
František Janouš z Rumburku
Milan Krupička z Volar
Jan Kukla z Prahy
Ota Lhoták z Děčína - Podmokel
Karel Maurenz z Karlových Varů
Anna Milatová z Třince
František Motyčka z Letohradu

Františka Novotná ze Šardic
 Josef Otta ze Šumperku
 Milena Ottová ze Šumperku
 Jiří Pelech z Řepova
 Mgr. Milena Picková z Brna
 Ladislav Piotrowski z Ostravy
 Jana Plamínková ze Želetic - Nenkovic
 Rostislav Podepřel z Veverské Bítýšky
 Alena Růžičková-Pavlinová z Brna
 Jaroslav Šperling z Prahy
 Štefan Takáč z Uničova
 Milena Takáčová z Uničova
 Vojtěch Tesař z Holýšova
 Josef Vaněček ze Slaného
 Aleš Vávra z Lomnice nad Popelkou
 Anna Vozáková ze Slavičína
 Blanka Žubová z Lysé nad Labem

Všem jmenovaným ještě jednou děkujeme.

Při této příležitosti upozorňujeme, že možnost převzetí zboží v naší prodejně, tak jak bylo výše uvedeno, není časově nějak omezoována. Zboží je možno kdykoliv si vybrat buď osobně nebo objednat poštou.

zp

POR ESTI INFORMITA...

Eventoj

*Internacia gazeto pri la E-Movado!
 Aktualaj informoj, faka aplikado,
 kaj represo de elektitaj artikoloj
 el la esperanta gazetaro.
 Kotizperantoj en 22 landoj.*

Aperas 2-semajne!

Abonkotizo por 1993: 360,- Kčs

*La abondeziron sendu al la redakcio,
 la kotizon al la kotizperanto:*

*ĈEA, Vladimír Dvořák,
 Jiřská 10, CS-110 00 Praha-1.*

*Petu provokzempleron de: LINGVO-Studio,
 H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario.*

*Multe da felico en 1993
 deziras la redakcio de Staro*



Český esperantský svaz
110 01 Praha 1, Jilská 10

* * * **STARTO** * * *

Nepravidelný věstník Českého esperantského svazu. Vychází 6x ročně. Je určen členům svazu. Odpovědný redaktor: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno.** Administrátor: **Karel Daněk, box 425, 660 25 Brno 2.**

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro: **Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.**

Administrators: **Karel Daněk, poŝta kesto 425, 660 25 Brno 2, Ĉeĥoslovakio**
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia asocio. Abonprezo: 14 guldenoj.

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Povoleno JmŘS Brno:

Č.j. P/3-8847/91 ze dne 28.8.1991

Podávací pošta:

664 03 Podolí u Brna